# ESPERANTO

sub la suda kruco

marto 2023



Vizito al eta San-Marino - paĝo 12



# ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

**OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ**
Volumo 30[4] numero 149 marto 2023

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
**Redaktisto**: Terry Manley
**Provlegantoj**: Donald Rogers, Trevor Steele, Nicole Else
**Kunordigisto:** Jonathan Cooper
**Kontaktadreso:** esk@esperanto.org.au

AEA – ESK
GPO Box 2122
Melbourne, Victoria 3001
Australia

**Abonoj kaj pasintaj numeroj**
*Esperanto sub la Suda Kruco* estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:
AEA: www.esperanto.org.au / info@esperanto.org.au
NZEA: www.esperanto.org.au / esperantonewzealand@gmail.com

**Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruco**
Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk@esperanto.org.au

Artikoloj kaj originalaj en Esperanto kaj tradukitaj en Esperanton estas akcepteblaj. Sed NE sendu permaŝinajn tradukojn (ekzemple per Google Translate).

**Limdato por kontribuoj por la sekva numero**
15a de majo 2023

La redaktistoj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright @ 2023 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 1038-9380

**SUR LA KOVRILO:** *Fortikaĵoj en San-Marino* – Vidu paĝon 12.
Pri aliaj fotoj, vidu paĝon 30.

# ENHAVO


Antaŭparolo 04

Strangaj sed veraj faktoj 05

Intervjuo kun Charles Stevenson 08

Fiksiĝinta 10

Letero al la redaktisto (kaj respondo) 11

Vizito al eta lando, San-Marino 12

Brua poluaĵo en la maro 14

Financaj raportoj de AEA 16

Fotoj de la Kongreso 2023 20

La poezio de Kit Kelen 24

Aŭstralio: Opinioj evoluas 25

Pri ekzamenoj 26

Arboj 27

El la regionoj: Sud-Aŭstralio 29

# Antaŭparolo

**TERRY MANLEY**

En Januaro okazis la somerkursaro kaj kongreso de AEA en Melburno. En 2021 kaj 2022 tiuj estis nur virtualaj. Katalin Kovats estis la ĉefinstruisto kaj preleganto en Melburno kaj bone distris la malmultajn ĉeestantojn ĉe la kursaro.

Ĉu ne multaj ĉeestis pro la fakto ke ĝi estis la unua reala kongreso post jaroj de ekranaj renkontiĝoj aŭ pro aliaj kialoj? Jam komenciĝis planoj por la somerkursaro en 2024 kaj la estraro esploras, ĉu okazigi ĝin en Ballarat, Viktorio.

Katalin kuraĝigis la partoprenintojn en Melburno ekzameniĝi ĉe edukado.net kaj kelkaj el ni planas fari tion en Junio. Vizitu la retejon kaj pripensu ekzameniĝi.

De tempo al tempo legantoj sendas al ESK kritikojn pri mistajpaĵoj kaj eraroj kiujn la teamo ne rimarkis. En ĉi tiu unua numero de ESK por la jaro, ni inkluzivas leteron, kiu temas pri la elekto de kovrilaj bildoj. Do por ke la komentoj konserviĝu, ni publikigas tiujn. Se vi deziras komenti, bonvolu sendi noton al la redaktisto.



*Vizito al la Nacia Galerio de Viktorio dum la Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Somerkursaro kaj Kongreso,12  januaro 2023*



# Strangaj sed veraj faktoj

**JOANNE JOHNS (MELBURNO)**

*Snopes.com estas retejo, kiu kolektas asertojn de sociaj retoj, modernaj legendoj, blagoj kaj folkloro, kontrolas la faktojn, analizas la indikaĵojn, kaj raportas pri la vereco de la asertoj.*

*Jen kelkaj ekzemploj de strangaj sed veraj faktoj, laŭ snopes.com.*

**Moskulo kun vampiraj dentoj estis trovita en Afganujo.**

Ĝi sonas kvazaŭ halovena[1] blago, sed la societo de naturkonservado raportis en 2014, ke esploristaro vidis maloftan kaŝmiran moskulon en nordorienta Afganujo.

La specio, konata pro ĝiaj vampirecaj dentoj, estas preskaŭ malaperinta pro habitata perdo kaj kaŝ-ĉasado. Bedaŭrinde, pro la roka tereno, ili ne kapablis fari foton. La lastan fojon, kiam scienca teamo vidis kaŝmiran moskulon, estis en 1948.



*Simila siberia specio*

[1] neologismo laŭ la angla “Halloween”

**Betty White estis pli aĝa ol tranĉita pano.**

En la tagoj antaŭ la 99a naskiĝdatreveno de (nun forpasinta) aktoro Betty White en 2021, uzanto de Tvitero[2] asertis, ke ŝi estis pli aĝa ol tranĉita pano – kaj pravis.

White naskiĝis la 17an de januaro, 1922. La unua komerca maŝino por tranĉi panon estis kreita ĉirkaŭ 1928 en Iovao, Usono, de Otto Frederick Rohwedder.



Betty White

**Urbo en Ohio, Usono, gastigis scenejon en filmo pri elreliĝo de vagonaro transportanta danĝerajn varojn – kaj poste spertis tre similan elreliĝon.**

Ofte snopes.com trovas, ke fotoj de nerilataj eventoj estas disvastigataj post kiam novaj katastrofoj okazas, ekzemple post la lastatempa tertremo en Turkujo, oni ree disvastigis fotojn de aliaj tertremoj kaj ŝajnigis, ke ili estas novaj. Tamen en ĉi tiu kazo, la disvastigata foto veras.

En 2021 multaj enloĝantoj de East Palestine, Ohio, rolis kiel kromrololuloj en la filmo *White Noise* (Blanka Bruo). En la filmo okazas elreliĝo, kiu kaŭzas grandan toksan nubon. Pro tio, la enloĝantoj devas forlasi siajn hejmojn.

La 4an de februaro 2023 okazis vera elreliĝo en la sama urbo, kaj la samaj enloĝantoj, kiuj rolis en la filmo, devis fuĝi de vera toksa nubo.



Scenejo de elreliĝo en la filmo



La vera elreliĝo

[2] neologismo laŭ la angla "Twitter"

**La Baraĵo Tri Gorĝoj en Ĉinujo estas kapabla reteni sufiĉe da akvo por pli malrapidigi la rotacion de la Tero.**

La Baraĵo Tri Gorĝoj kreas la plej grandan hidroelektran baraĵon en la mondo. Levi akvon je pezo de 42 miliardoj da tunoj al 175 metroj super la marnivelo pli malrapidigus la rotacion de la Tero (tre malmulte), kaj kaŭzus pliigon de la longeco de tago je 0,06 mikrosekundoj.

Tamen, por konservi perspektivon, komparu tion al la efikoj de la tertremo kaj cunamo en Indonezio en 2004, kiu malpliigis la longecon de tago je 2,68 mikrosekundoj.




*Baraĵo Tri Gorĝoj*

**Rusaj sciencistoj vekis du 40 000-jaraĝajn vermojn.**

En 2018, rusaj sciencistoj malfrostigis du speciojn de prahistoriaj vermoj (*Panagrolaimus detritophagus* kaj *Plectus parvus*), kiuj estis en ĉiamfrosta grundo dum 32 000 kaj 41 700 jaroj.

Kiam ili ekmoviĝis, la nematodoj estis metitaj en petri-pladojn kaj nutritaj per bakterioj.



*Nematodoj ege pli aĝaj ol tranĉita pano*



*Helen Keller*

**Helen Keller (surdblinda ekde sia infanaĝo) iam flugis aviadilon.**

En 1946, Helen Keller flugigis kvarmotoran aviadilon Douglas Skymaster super Mediteranon dum vojaĝo de Romo ĝis Parizo.

Kvankam la flugo okazis antaŭ preskaŭ 80 jaroj, uzanto de TikTok furoriĝis en 2020 kun la sarkasma aserto, ke Keller estis mensogulo.

Tamen ŝi ja pilotis dum dudek minutoj, sekvante instrukciojn interpretataj per tuŝlingvo.

# Intervjuo kun Charles Stevenson okaze de la apero de 'Galerio de Esperantistoj en Aŭstralio'

KATJA STEELE (ADELAJDO)

**KS:** Evidente, vi havas inklinon al historio, eĉ se vi estis profesie instruisto pri la angla.

**CS:** Mia intereso pri historio venas de mia infana raviĝo pri la rakontoj de mia patrino pri ŝia knabinaĝo malproksime de nia valo en la viktoria Montaroj Dandenong. Mia patrino, kiam ŝi estis kvarjaraĝa, alvenis de Brisbano, kie ŝi naskiĝis kaj kreskis en la jorkŝira vilaĝo East Bierley. Mi lernis de ŝi, ke ni ĉiuj kantas feliĉe kaptitaj en nia kultura krado, la krado de nia familia edukado, eble ankaŭ de nia religio. Sed estas tre necese forflugi kune, super la mondon, konsciaj pri similecoj inter diversaj nacioj, kaj respektantaj niajn diferencojn.

**KS:** En la enkonduko de la Galerio vi skribis, ke la unuaj esperantlingvaj revuoj donis tre malmultajn informojn pri la aktualaj movadanoj kaj ke bona fonto estis por vi la anglalingvaj ĵurnaloj. Kiuj el ili estis la plej utilaj por vi?

**CS:** *La Aŭstralia Esperantisto*, kiu komenciĝis en 1923, okupiĝis nur pri gramatiko, esperanta verkado, kaj ankaŭ pri registrado de internaciaj Esperanto-eventoj. Estis por mi malesperige, ke mankis eĉ informo pri la morto de kelkaj gravaj esperantistoj.

Nuntempe oni havas mirindan fonton de informoj pri la historio en la aŭstraliaj gazetoj atingeblaj pere de la reto. Tie oni trovas raportojn pri la fruaj esperantaj kunvenoj kaj listojn de estraranoj de ĉiu asocio. En la malnovaj tempoj oni ofte aperigis la nekrologojn de esperantistoj en la lokaj neesperantistaj gazetoj. Por la frua Esperanto-movado en Aŭstralio ĉi-tiuj gazetoj tre gravas, sed poste, jam en *La Aŭstralia Esperantisto*, eldoniĝis biografioj verkitaj de Arthur Copping kaj Faye Koppel.



**KS:** Ĉu ni, la nunaj esperantistoj, postlasas por niaj posteuloj sufiĉajn spurojn por iam kompreni, resumi nian laboron? Kion vi proponas por plibonigo?

**CS:** Gravas por la nuna generacio konservi registraĵojn pri tio, kion ĝi faras.

Estas same grave, ke ĉi tiuj donitaĵoj estu konservitaj. La granda demando estas, kiel ni faru tiun konservadon. Estas sufiĉe facile por iu ajn detrui librojn, gazetojn, fotojn ktp. kiel nenecesan rubaĵon. Do taŭga konservado estas esenca.

**KS:** Vi laboris super tiu ĉi biografiaro dum du jaroj. Ĉu estis grandaj surprizoj, kiujn vi trovis?

**CS:** Mia granda malkovro en serĉado pri pasintaj esperantistoj estis la vario de fontoj, ke la komercaj lernejoj kaj ĵurnalistoj multe interesiĝis pri la kresko de Esperanto kiel tutmonda helplingvo. Ankaŭ surprizis min, ke Esperanto estas plejparte subtenata de migrantoj el aliaj landoj.

**KS:** Vi opiniis en la enkonduko, ke oni ne vere povas verki historion – tezon bazitan sur kritika esploro kaj analizo de fontoj. Kial ĝis nun neniu entreprenis verki ĝin?

**CS:** Eble la plej fascina aspekto de la historio estas historiografio. Kiel verki historion? Ĉu laŭ la kristana vidpunkto, la islama vidpunkto, aŭ komunista vidpunkto? Kiu vere pravas? Ĉu la maldekstra historio estas pli signifa ol la dekstra historio? Alivorte, ni ĉiuj vidas la mondon per niaj propraj individuaj okuloj. Eblas multaj interpretoj. La historio estas pli ol nur kronologio de faktoj. Ĝi devas argumenti apartan vidpunkton. En Aŭstralio Esperanto kreskis en etaj lokaj kaj apartaj grupoj, kiuj dum kelka tempo floris, poste forvelkis pro diversaj kialoj, eble mortoj aŭ ŝanĝo de laborloko, aŭ - ĉu mi kuraĝas diri – manko de intereso. Mia opinio estas, ke la historio de Esperanto devas esti tutmonda afero, kie okazis diversaj movadoj kun la organizo, diversaj pensoskoloj ktp. Aŭstralio estas nur malgranda parto de ĉi tio. Mia konstato estas, ke la plej bona maniero verki la rakonton de Esperanto en Aŭstralio estas simple verki bildetojn de la homoj, de la diversaj viroj kaj virinoj, kiuj apartenis al ĝi.

**KS:** Kiom da nomoj vi trovis entute?

**CS:** Mi ne certas ekzakte. Eble 700.

**KS:** Ĉu la serĉlaboro estis foj-foje teda aŭ vi entuziasmis?

**CS:** Labori pri la biografioj de homoj el la pasinteco, estis kontentiga kaj en multaj kazoj ekscita. Ĉagrenis min, ke mi ne povis eltrovi multon pri homoj, kiuj fascinis min. Ekzemple, mi ŝatus skribi pli pri Adrienne Paling, unu el la bonegaj homoj, kiujn mi renkontis en mia vivo,



sed estis malmulte da informoj pri ŝi.

**KS:** Se vi devus elekti la tri plej gravajn figurojn de la movado, kiujn vi elektus?

**CS:** Tio estas tre malfacila demando! Samuel McBurney venas en mian menson, ĉar li estis tiel feliĉa viro, kiu instruis muzikon tra la tuta Aŭstralio, kaj mi suspektas, ke estis li, kiu influis Tilly Aston esperantistiĝi. Joseph Scurry fascinas, ja memedukita, kun klaraj opinioj kaj vigla. Inter virinoj mi dirus, ke Win Addis kaj Thea van den Boorgaard, ambaŭ sindonemaj esperantistinoj kun fascinaj fonoj, komplementis unu la alian – la amikeco de Thea komplementis la foje severan sintenon de Win. Tion dirinte mi ellasis Adrienne Paling kaj Fred Williams, la unuajn kiuj prezentis Esperanton al mi kaj mian talentan Esperanto-instruiston Len Newell, mian mirindan instiganton.

## Fiksiĝinta

**DAVID ROCKELL (AŬKLANDO, N-Z)**

En januaro mi, eks-Velingtonano kiu nun loĝas en Aŭklando, ĝuis semajnon en Velingtono. Mi trovis, ke nur mulmulto ŝanĝiĝis post mia lasta vizito en 2019 por la kongreso de NZEA. La kialo de la longa intertempo estas tute simple KOVIMo.

Ĉio iris tre bone kaj glate ĝis la tempo por reveni al Aŭklando la 27-an de januaro, la tagon kiam torente pluvegis en Aŭklando. Mi alvenis en la flughavenon je ĉirkaŭ la 2-a por flugo je la 5a ptm, kiu fine ekflugis 2-3 horojn malfrue.

Tamen, ni jam aŭdis anoncon, ke la aviokurejaj lampoj en Aŭklando paneis. Aviadiloj ne povas surteriĝi sendanĝere en la mallumo sen la lampoj.

Kiam ni flugis super la regiono Taranaki, do proksimume duonvoje, la piloto anoncis: "Pardonon, Gesinjoroj, mi havas iomete pli da malbona novaĵo. Ni devas returniĝi al Velingtono."

La sekvanta anonco, post kiam ni surteriĝis kaj elaviadiliĝis, estis ke ĉiuj flugoj morgaŭaj estas jam plene rezervitaj.

Post atendo en longa starvico, mi sukcesis aranĝi ke mi flugu hejmen post du noktoj.

Mi devas danki al la Velingtona flughaveno. La administrantoj permesis al ni resti en la terminalo tra la tutaj noktoj (kutime ĝi fermiĝas dum unu horo frumatene) kaj ili donis al ni senkostajn picojn la unuan nokton.

Por pasigi la tempon, mi legis multe, inkluzive e-libron en Esperanto, *Malamu vin, unu la alian*, de Manuel de Seabra. Ĝi temas pri la vivo de portugala knabo dum kaj tuj post la dua mondmilito.

Mi ne povas diri, ke mi ĝuis la du noktojn sidante en seĝo anstataŭ kuŝi en lito, sed mi devas konfesi, ke ĝi estis interesa, nova sperto.



# Letero al la redaktisto (kaj respondo)

Kara ESK,

La kovrilo de la decembro-2022a eldono de ESK estas malbona. Ĝi aspektas monstra kaj malbela, kaj eligis la vortojn "Aĥ terure!" Jen esperantisto? Esperanto jam ŝajnas fremda, stranga kaj nenormala por multe da homoj; eble tiu kovrilo ja konfirmis tion! Pro tiu aspekto, mi ne volis montri nian gazeton al aliaj homoj ekz. sur kafotablo; anstataŭe mi kaŝis ĝin.

Mi ne malkonsentas pri via elekto presi artikolon pri artefarita inteligenteco. Jen interesa, nuntempa temo. Tamen, la "granda temo" de Esperanto, kaj espereble nia gazeto, estas la kunigado de homo de malsamaj lingvoj kaj landoj en feliĉo, amikeco kaj frateco. Tiu temo estas alloga por kaj esperantistoj kaj neesperantistoj. Do, laŭ tiuj kriterioj, kaj mia opinio, la foto de Ilia kaj Teofilo en Melburno sur la malantaŭa kovrilo ja estis multe pli bona kaj pli taŭga!




(Aliaj lastatempaj kovriloj ankaŭ ne montris tiun temon, ekz. bela, homo-malplena pejzaĝo; sed tiuj mankas al la malbeleco de la nun-fifama ekstertera – esperantista? – knabo kun ruĝa pulovero!)

Dankon ke vi legas tiun ĉi leteron. Bonvolu konsideri pli taŭgan aŭ pli belan kovrobildon estontece. Bondezire,

**Marc Schmidt, Cooma, NSW**

Saluton Marc,

Pri la kovrilaj bildoj estas bone havi vian respondon/opinion. Mi devas konfesi ke pro mia amo al la Naturo mi preferas tiajn bildojn – kaj jes, senhomajn. Ofte la elekto de la bildo estas farita de la kunordigisto/formatisto de la gazeto. Antaŭe Joanne Johns faris, kaj nuntempe Jonathan Cooper faras. Tiuj (kaj antaŭe aliaj) konsideras la kvaliton de la bildo, la temon de iu artikolo ena, estontan eventon, kaj aliajn aferojn kaj tiam elektas. Trarigardante la kovrilojn de la pasintaj 14 jaroj mi rimarkas tre diversajn bildojn. Foje ĉiutagaj aferoj – konstruaĵoj, foje la naturo, foje renkontiĝoj kaj esperantistoj. Ofte sur la dorsa kovrilo estas fotoj de esperantistoj. En la fruaj koloraj eldonoj (2008–09) tiuj bildoj sur la dorsa kovrilo estas iom ŝokigaj, eble por havigi la atenton de la rigardanto. Mi mem ne ŝatas tiujn.

Estas interese ke la bildo de ET tiom mallogis vin. Mi ne scias ĉu ĝi plaĉas al aliaj. Certe ET, por multaj homoj, ne estas bela estaĵo. Ĉu la infanetoj de tiu epoko (de la filmo *ET*) suferis pro timego al tiu vizaĝo?

Do resume, mi opinias ke la diverseco de la kovrilaj bildoj estas bona, kaj ne deziras ke tiuj estu laŭ unu temo. Se estos konsento, mi publikigos vian leteron en ESK por instigi pli da reago kaj opinio pri ĝiaj aspekto kaj enhavo. La gazeto estas ja la posedaĵo de la membroj de AEA kaj NZEA. Do ne forgesu... verku por ke ĝi daŭre aperu.

**Terry Manley, redaktisto**

# Vizito al eta lando, San-Marino

## DAVID RYAN (WELLINGTON, N-Z)

En januaro 2023 mi vizitis Eŭropon kun mia familio. Ni profitis nian tempon en Italio por viziti etan landon. Ne, ne temas pri Vatikano, sed pri la Respubliko de San-Marino, tre malgranda kaj preskaŭ nekonata lando.

San-Marino troviĝas en la nord-orienta parto de Italio apud la itala urbo Rimini. Ĝi estas enklavo tute ĉirkaŭita de Italio. Ĝi ne havas flughavenon kaj oni povas eniri la landon nur per aŭtomobilo/aŭtobuso. Ne ekzistas videbla, oficiala landlimo inter San-Marino kaj Italio: ne estas doganaj kontroloj. Ni iris en aŭtomobilo de la stacidomo de Rimini. Ni sciis, ke ni eniras San-Marinon nur kiam ni vidis indikilon apud la vojo "Bonvenon al San-Marino".

La loĝantaro de San-Marino estas proksimume 34 000 en lando de nur 61 km². La oficiala lingvo estas la itala kaj oni uzas la eŭron. Tamen, San-Marino havas sian propran registaron, armeon (kiu ludas ĉefe ceremonian rolon), televidan stacion, tagĵurnalojn, flagon ktp. San-Marino estas membro de la Unuiĝintaj Nacioj kaj troviĝas tie itala ambasadejo kaj konsulejoj de aliaj landoj. Tamen, la ŝtato dependas multe de Italio kaj ŝajnas, ke plejmultaj turistoj estas italoj, kiuj volas pasigi semajnfinon en 'fremda' lando.

La sanktulo Santa Marino fondis la landon, aŭ pli precize monaĥan komunumon, en la jaro 301. En la 19-a jarcento kiam Italio unuiĝis, San-Marino konservis sian sendependecon kaj ĝi restis neŭtrala dum la Dua Mondmilito.

Do, kion fari en ĉi tiu eta lando? Oni ne





*Fortikaĵoj en San-Marino*

bezonas multan tempon! Estas muzeoj, preĝejoj, kaj tri tre interesaj fortikaĵoj sur monto, kie troviĝas la ĉefurbo. Ekde tie oni havas belan vidon orienten ĝis la Adriatika Maro. En butikoj oni vendas precipe poŝtmarkojn, parfumojn, monerojn, kaj eĉ armilojn (ĉar la loka leĝo ne estas tre malpermesema).

Pri Esperanto, San-Marino estis sidejo ĝis 2008 de la Akademio Internacia de Sciencoj, de kiu unu el la laborlingvoj estis Esperanto.



*Ĉefplaco*

# Brua poluaĵo en la maro

**DONALD ROGERS (WELLINGTON, N-Z)**

Multaj homoj kredas, ke la fiŝoj ĝenerale estas silentaj. Sed ne. Aroj de eĥinoj kraketas je tagiĝo kaj je krepusko, skrapante algojn de la rokoj; malgrandaj zeŭsoj bojas; grandokulaj fiŝoj kraketas ritme en la mallumo, por ke ili restu kune en unu grupo. Krakantaj salikokoj plaŭdigas siajn ŝajne tro grandajn pinĉilojn por senkonsciigi sian predon. Pagajaj kraboj sonigas rapidan "viba-viba" kvazaŭ tamburon, kaj malrapidan klakadon kvazaŭ lignan bastonon tiratan laŭ malglata surfaco. La maraj mamuloj ofte bruas – la ĝibaj balenoj kantas al siaj konatoj, kaj delfenoj vokas al siaj amikoj per sonoj kaj ultrasonoj.

Sed homoj portas pneŭmatajn martelojn al la maro. Sono bone moviĝas tra akvo. Motorboatoj kaj ŝipoj estas tre bruaj. Estas nur lastatempe, ke sciencistoj mezuras, kiom tia bruo ŝanĝas la maran medion.

Modernaj hidrofonoj kaj maŝina lernado helpas sciencistojn aŭskulti la sonojn en la maro. Oni konstatas, ke la bruoj de konstruado kaj ŝipado influas la konduton kaj vivon de marbestoj, kaj eĉ de marplantoj. Dum la devigaj hejmrestadoj de la kovima pandemio, sciencistoj havis raran ŝancon aŭdi, kiel la maro sonas sen homoj. La nivelo de bruo falis al triono. Ili registris vokojn de balenoj de Bryde, la fajfadon kaj klikbruojn de delfenoj, bojojn de fokoj, kraketojn kaj gruntojn de fiŝoj, kaj la sonojn de ondoj ĉe plaĝo for tri kilometrojn.

Sono iras rapide en la oceano, do multaj bestoj evoluis, dependante de sono por navigi, serĉi manĝaĵon, allogi parulon, kunordigi la frajadon, eviti rabobestojn, spuri siajn idojn kaj rivalojn, aŭ serĉi novan hejmon.

Homa bruo en la maro malhelpas la marbestojn, kiel nebulo malhelpas al homoj. Daŭra brua poluaĵo povas maski la konversaciojn de bestoj kaj de la ĉirkaŭaĵo. Ekzemple, antaŭ la hejmrestado, la grandokulaj fiŝoj povis aŭdi siajn kunulojn ĝis nur kelkaj metroj. Sen la boatoj, ilia aŭdodistanco kreskis al 155 metroj. Se ili devas naĝi en malgranda grupo, ili ofte maltrafas okazojn trovi nutraĵon, do ili devas iri pli longan distancon por satiĝi, kaj ili spertas pli altan streĉitecon. La boatoj uzataj de homoj por spekti balenojn igas la balenojn pasi malplian tempon nutrante la idojn. Boatoj kun elektraj motoroj estas pli kvietaj kaj ne ĝenas la balenojn. En laboratoria eksperimento oni rimarkis, ke la planto pozidonio suferas akutan damaĝon kiam oni ludas al ĝi diversajn registritajn homajn sonojn.

Nun oni povas aĉeti hidrofonon kaj magnetofonon en unu skatolo, kiun akomodas plasta tubo, kaj oni povas trejni komputilon traserĉi milojn da horoj de registraĵoj kaj listigi la sonojn kiuj interesas. Oni povas instali hidrofonojn ie ajn. Multaj estaĵoj en la maro faras sonojn. Esploristoj kolektas registraĵojn en granda biblioteko por kompari. Maŝinoj ne ĉiam povas identigi la beston, kiu faris specifan sonon. Tio postulas zorgan observadon en la maro aŭ en laboratorio. Tiam sciencistoj povas trejni komputilojn por distingi marbestojn disde la fona bruo. Tamen esploristoj identigis ĝis nun nur malgrandan proporcion de la marbestoj, kiuj faras la sonojn, kiujn ili registras.

Homa bruo negative influas la vivojn

de maraj bestoj. Pri la balenoj de Bryde, kiam ŝipoj troviĝas super ili, ilia kapablo komuniki falas je 99%. Kiel oni povas eviti tion?

Malkiel aliaj specoj de poluaĵo – ekzemple plastoj, kemiaĵoj kaj karbona dioksido – forigi bruon estas simpla. Kiam oni malŝaltas la bruon, tiam ĝi ĉesas.

Oni taksas, ke ŝipoj en Golfo Hauraki plimultiĝos je 75% en la sekvaj 20 jaroj. Helicoj kaŭzas 85% da ŝipa bruo. Fasoni helicojn por eviti kavitacion – formiĝon de bobeloj en la akvo – pliigas la efikecon kaj signife reduktas la bruon. Ankaŭ helpas transiri al elektraj motoroj, aŭ iri malpli rapide, aŭ eviti zonojn, kie bestoj nutras sin aŭ bredas.

Inĝenieroj evoluigas "bobelajn kurtenojn" por redukti la bruon de konstruado en la maro, kaj "marajn vibrilojn" por anstataŭi bruajn pafilojn por seisma ekspertizo. Kiuj studas ĉi tiujn aferojn, tiuj volas, ke oni devige reduktu bruojn en maraj protektataj zonoj.

## Referenco

*The undersea orchestra*, Kate Evans, New Zealand Geographic, May–June 2022, pp 60–74. **www.nzgeo.com/stories/the-undersea-orchestra/**
Se oni iros al la retpaĝo de la artikolo, oni povos elekti ligitajn paĝojn, kie oni povos aŭskulti sonojn registritajn sub la maro.

## Terminoj

**baleno de Bryde**: Bryde's whale, aŭ Brooder's whale, diversaj specoj de svelta baleno, rilataj al la ĝiba baleno

**eĥino**: kina, *Evechinus chloroticus*

**grandokula fiŝo (malgranda perkoforma fiŝo)**: big-eye fish

**ĝiba baleno**: humpback whale, *Megaptera novaeangliae*

**hidrofono**: instrumento por registri sonon en akvo

**kavitacio**: formiĝo de vaporbobeloj en likvaĵoj ĉe malalta premo

**pagaja krabo**: pāpaka, New Zealand paddle crab, *Ovalipes catharus*

**pozidonio (planto)**: Neptune grass, *Posidonia oceanica*

**salikoko**: shrimp

**ultrasono**: altfrekvenca sono, kiun homoj ne povas aŭdi

**zeŭso (malgranda fiŝo)**: John Dory, *Zeus faber* – por bildoj de la zeŭso iru al **commons.wikimedia.org/wiki/Category:Zeus_faber** Tie oni povas serĉi ankaŭ aliajn marbestojn.



*Zeŭso*

# Financaj raportoj de AEA

Ni pardonpetas, ke la financa raporto de 2021 ne aperis en la unua numero de 2022. Do, ni publikigas ĝin nun ĉi tie, kune kun la raporto de 2022.

## Australian Esperanto Association

*C/- G.P.O. Box 2122*
*Melbourne 3001*

### Profit & Loss Statement

### 1/01/2021 through 31/12/2021

**2/02/2023**
**4:45:14 PM**

| | | | |
|---|---|---|---|
| Income | | | |
| Membership Subscriptions | | $1,788.41 | |
| Congress Income 2022 | | $410.00 | |
| Congress income 2021 | | $870.28 | |
| ESK Reimburse. from NZ | | $1,370.00 | |
| Bank Interest Received | | $0.12 | |
| Donations | | $95.00 | |
| Fonduso a/cs interest | | $1,719.11 | |
| Internat. Travel Fund Interest | | $474.59 | |
| Correspondence course | | | |
| Term Dep. Int. -Correspondence | $70.79 | | |
| Total Correspondence course | | $70.79 | |
| Total Income | | | $6,798.30 |
| Cost of Sales | | | |
| Gross Profit | | | $6,798.30 |
| Expenses | | | |
| Bank fees | | $62.87 | |
| Currency Variations | | $68.22 | |
| 2022 Congress/Summerschool | | $1,048.80 | |
| Computer & internet expenses | | $489.29 | |
| Miscellaneous Expenses | | $35.00 | |
| Consumer Affairs Fees | | $59.20 | |
| ESK Printing | | $1,793.14 | |
| Postage | | $1,847.43 | |
| Repairs and Maintennce | | $144.81 | |
| Printing & Stationery | | $561.42 | |
| UEA Membership | | $225.11 | |
| Total Expenses | | | $6,335.29 |
| Net Profit / (Loss) | | | $463.01 |

**Australian Esperanto Association**
*C/- G.P.O. Box 2122*
*Melbourne 3001*

# Balance Sheet

# As of December 2021

**2/02/2023**
**4:44:30 PM**

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Assets | | | | |
| Current Assets | | | | |
| Cash On Hand | | | | |
| CBA Operating A/c 00903636 | $13,079.14 | | | |
| Congress A/c 00946975 | $236.62 | | | |
| Petty Cash | $100.00 | | | |
| Total Cash On Hand | | $13,415.76 | | |
| Fondusoj | | | | |
| CBA Term Deposit 50170900 | $50,000.00 | | | |
| CBA Term Deposit 94715 | $53,284.08 | | | |
| Int. Travel Fund 50143134 | $71,702.39 | | | |
| Total Fondusoj | | $174,986.47 | | |
| PAYPAL | | $1,797.80 | | |
| UEA Account Code AEAA-Z | | $778.63 | | |
| Correspondence Course | | | | |
| Correspondence Bank A/c 918439 | | $1,069.34 | | |
| CBA Term Deposit 444650058017 | | $10,000.00 | | |
| Correspondence Course Books | | $1,166.84 | | |
| Total Current Assets | | | $203,214.84 | |
| Other Assets | | | | |
| Accounts Receivable | | $1,351.20 | | |
| Book Inventory | | | | |
| Libroservo | $952.50 | | | |
| AEA Library | $7,145.28 | | | |
| Total Book Inventory | | $8,097.78 | | |
| Total Other Assets | | | $9,448.98 | |
| Property & Equipment | | | | |
| Equipment | | | | |
| Equipment at Cost | $1,516.27 | | | |
| Total Equipment | | $1,516.27 | | |
| Total Property & Equipment | | | $1,516.27 | |
| Total Assets | | | | $214,180.09 |
| Liabilities | | | | |
| Net Assets | | | | $214,180.09 |
| Equity | | | | |
| Fondusdoj Funds | | | $145,762.17 | |
| Retained Earnings | | | $60,953.61 | |
| Life Membership Funds | | | $5,851.06 | |
| Current Year Earnings | | | $463.01 | |
| Historical Balancing | | | $1,150.24 | |
| Total Equity | | | | $214,180.09 |

# Australian Esperanto Association

*C/- G.P.O. Box 2122*
*Melbourne 3001*

## Profit & Loss Statement

## 1/01/2022 through 31/12/2022

**2/02/2023**
**4:41:01 PM**

| | | | |
|---|---|---|---|
| Income | | | |
| Membership Subscriptions | | $2,000.00 | |
| Congress Income 2022 | | $818.26 | |
| Congress Income 2023 | | $12,865.70 | |
| Book sales | | $30.00 | |
| ESK Reimburse. from NZ | | $840.00 | |
| Donations | | $420.00 | |
| Fonduso a/cs interest | | $1,484.35 | |
| Miscellaneous Income | | $297.00 | |
| Libroservo Income | | | |
| Interest received | $30.02 | | |
| Total Libroservo Income | | $30.02 | |
| Total Income | | | $18,785.33 |
| Cost of Sales | | | |
| Gross Profit | | | $18,785.33 |
| Expenses | | | |
| Bank fees | | $12.21 | |
| Book printing | | $2,531.75 | |
| 2022 Congress/Summerschool | | $500.00 | |
| 2023 Congress Expenses | | $5,148.17 | |
| Depreciation/ Write-down Exp | | $1,166.84 | |
| Dues & Subscriptions | | $16.00 | |
| Computer & internet expenses | | $1,061.49 | |
| Consumer Affairs Fees | | $60.10 | |
| ESK Printing | | $1,412.06 | |
| Postage | | $2,571.59 | |
| Promotional expenses | | $116.00 | |
| Library & Archives expenses | | $144.00 | |
| Printing & Stationery | | $1,019.52 | |
| Total Expenses | | | $15,759.73 |
| Net Profit / (Loss) | | | $3,025.60 |

# Australian Esperanto Association

*C/- G.P.O. Box 2122*
*Melbourne 3001*

## Balance Sheet

## As of December 2022

**2/02/2023**
**4:41:49 PM**

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Assets | | | | |
| Current Assets | | | | |
| Cash On Hand | | | | |
| CBA Operating A/c 00903636 | $5,111.51 | | | |
| CBA Summerschool/congress A/c | $4,815.00 | | | |
| Congress A/c 00946975 | $7,745.32 | | | |
| Petty Cash | $100.00 | | | |
| Total Cash On Hand | | $17,771.83 | | |
| Fondusoj | | | | |
| CBA Term Deposit 50170900 | $50,000.00 | | | |
| CBA Term Deposit 94715 | $53,423.45 | | | |
| Int. Travel Fund 50143134 | $71,702.39 | | | |
| Total Fondusoj | | $175,125.84 | | |
| PAYPAL | | $2,849.80 | | |
| UEA Account Code AEAA-Z | | $778.63 | | |
| Correspondence Course | | | | |
| Correspondence Bank A/c 918439 | | $1,069.34 | | |
| CBA Term Deposit 444650058017 | | $10,000.00 | | |
| Total Current Assets | | | $207,595.44 | |
| Other Assets | | | | |
| Accounts Receivable | | -$3.80 | | |
| Book Inventory | | | | |
| Libroservo | $952.50 | | | |
| AEA Library | $7,145.28 | | | |
| Total Book Inventory | | $8,097.78 | | |
| Total Other Assets | | | $8,093.98 | |
| Property & Equipment | | | | |
| Equipment | | | | |
| Equipment at Cost | $1,516.27 | | | |
| Total Equipment | | $1,516.27 | | |
| Total Property & Equipment | | | $1,516.27 | |
| Total Assets | | | | $217,205.69 |
| Liabilities | | | | |
| Net Assets | | | | $217,205.69 |
| Equity | | | | |
| Fondusdoj Funds | | | $145,762.17 | |
| Retained Earnings | | | $61,416.62 | |
| Life Membership Funds | | | $5,851.06 | |
| Current Year Earnings | | | $3,025.60 | |
| Historical Balancing | | | $1,150.24 | |
| Total Equity | | | | $217,205.69 |

# Fotoj de la Aŭstralia/Nov-Zelanda Kongreso kaj Somerkursaro 2023

Ekde 2019, iĝas "nova tradicio" en aŭstraliaj kongresoj, la fotokonkurso. Dum la semajno, kongresanoj estas invitataj fari fotojn kiuj spegulas la kongreson kaj/aŭ Esperanton. Dum la fina vespero, post la bankedo, ĉiuj fotoj estas montrataj sur granda ekrano kaj okazas popola elekto. Poste Jonathan Cooper, kiel la "oficiala juĝinto", anoncis la premio-gajnintojn. Jen elekto de fotoj, kaj de kelkaj kiuj ne estis en la konkurso.



*Maldekstre:* Ludvespero, *de Franciska Toubale, 1-a premio*

*Desktre, supre:* Ekster la kongresejo, *de Miranda Lutz, 2-a premio*

*Dekstre, malsupre:* Melburnaj konstruaĵoj, *de Caitlin McClusky, 3-a premio*


ESPERANTO
the international language


MELBOURNE









*Maldekstre, supre:* Joanne Johns, *de Katalin Kováts, aparte inda kaj la popola elekto*
*Maldekstre, sube:* Kongresanoj kune laborantaj, *de Doris Chen (ne en la konkurso)*
*Ĉi tiu paĝo:* Du grupfotoj (dimanĉa kaj vendreda), de *Kam Lee*

# La poezio de Kit Kelen

**JONATHAN COOPER (GOSFORD)**

La Aŭstralia Esperanto-Asocio lastan novembron publikigis libron de poemoj kaj bildoj, *Rompitaj Labirintoj*, de Kit Kelen. La Asocio donis la redakcian kaj dezajnan helpon, kiuj realigis ĉi tiun projekton. Trevor Steele donis al Kit detalajn konsilojn pri la Esperanta teksto, kaj la libro estis dezajnita kaj paĝaranĝita de Joanne Johns.

Christopher (Kit) Kelen verkis volumojn de poezio, kiuj eldoniĝis en dek lingvoj krom la angla. Ĉiu libro estas unike kreita, kun tradukisto aŭ tradukistoj, por specifa publiko. (Alivorte, neniu estas simple traduko de ekzistanta, anglalingva poemaro.) *Rompitaj Labirintoj* havas specialan signifon en la verkaro de Kit, ĉar ĝi estas la unua libro, kiun li mem verkis en lingvo alia ol la angla.

En poemoj kaj artaĵoj, Kit kreis ian "abstraktan meditadon" pri la nuntempa situacio de rifuĝantoj tra la mondo. Por rifuĝantoj kaj azilpetantoj, la mondo ja estas kiel multaj rompitaj labirintoj, plena de sakstratoj kaj blokoj, kiujn oni ne povus antaŭvidi. Laŭ Kit, la justa kaj neŭtrala lingvo, Esperanto, estas la plej taŭga kaj ĝusta ilo, per kiu esprimi tion al la mondo.

Jen du mallongaj poemoj el la libro:

**rondo**

ne estas la timo fali
estas la timo ke vi saltos
kiel la timo vi trovos vokiĝon
timo de aliĝeco
ne estas la timo ke vi suferos
sed ke la sufero de la timo venos
ne estas la timo fali
estas la timo ke vi saltos

**birdoj kantas**

kvar manoj faldos la ĉielon
krucos angulojn
formetos la tagon

kuŝu iom da tempo kun la lumo interne
do scivoli
kiu vokas la branĉeton por atingi
preter vintro
kiel mano varmocele glitinta en ganton

.

en foresto
de arbo, branĉo, folio senvorte

kaj sen ajna senco por la malsaĝeco
de dirado
birdoj kantas
ĉion, kion ili bezonas
estas la lumo



*Pentraĵo de Kit Kelen (detalo)*

# Aŭstralio: Opinioj evoluas

## TREVOR STEELE (ADELAJDO)

La eŭropa setlado de Aŭstralio en la 18-a jarcento estis tre simila al tiu en Nord- kaj Sud-ameriko kaj Nov-Zelando. Eŭropanoj simple eksproprietigis la indiĝenojn kaj nomis la teron sia. Por fari tion kun relative bona konscienco la "blankuloj" devis kredi, ke ili, kiel homoj de supera raso kun supera religio, rajtas tiel agi.

En la kazo de Aŭstralio la komenco estis paradoksa. La angla "malkovrinto" de la kontinento estis kapitano James Cook, homo relative larĝmensa por tiu epoko. Post ŝipveturado en 1770 laŭ la longa orienta marbordo de "Nova Holando", kiel oni tiam nomis la landon, dum kiu li plurfoje renkontis kaj observis la aborigenojn, Cook skribis:

> *Laŭ tio, kion mi diris pri la indiĝenoj de Nova Holando, ili eble ŝajnas esti la plej mizeraj homoj sur la Tero, sed fakte ili estas multe pli feliĉaj ol ni eŭropanoj.*
>
> *Ili vivas en trankvilo ne ĝenata de malegaleco de rangoj; la tero kaj la maro de si mem provizas al ili ĉiajn necesaĵojn de la vivo; ili ne deziras grandiozajn domojn, endomajn posedaĵojn ktp., ili kuŝas en varma kaj bela klimato kaj ĝuas tre sanan aeron, tiel ke ili apenaŭ bezonas vestojn kaj ili ŝajnas tute konscii pri tio; ĉar multaj, al kiuj ni donacis tukojn ktp., senzorge lasis ilin sur la mara plaĝo kaj en la arbaro, kvazaŭ aferojn neniel utilajn.*
>
> *Mallonge, ili ŝajne ne alte taksis ion ajn, kion ni donis al ili, kaj ili ne fordonus ion apartenantan al ili kontraŭ artiklo proponata de ni. Miaopinie tio pensigas, ke ili kredas, ke ili havas ĉiujn necesaĵojn de la vivo kaj nenion superfluan.*

Kaj tamen tiu relative humana maristo, atinginte la plej nordan pinton de la kontinento, proklamis la tutan landon posedaĵo de lia reĝa moŝto Georgo III de Granda Britio.

La setlado komenciĝis en 1788 kiel gulago por senigi Brition je krimuloj. En 1838 nova kolonio, Suda Aŭstralio, estis lanĉita. La unua guberniestro, Hindmarsh, predikis al la indiĝenoj, kiuj tre baldaŭ perdos sian teritorion:

> *Ni deziras feliĉigi vin. Sed vi ne povas esti feliĉaj, krom se vi imitos blankulojn. Konstruu domojn, portu vestojn, laboru kaj estu utilaj.*
>
> *Antaŭ ĉio vi ne povas esti feliĉaj, krom se vi amas Dion, kiu kreis la Ĉielon kaj la Teron kaj homojn kaj ĉion alian.*
>
> *Amu blankulojn, amu aliajn nigrajn tribanojn. Lernu paroli angle.*

Eble la guberniestra moŝto fakte volis siamaniere helpi la sendiajn sovaĝulojn, sed 20 jarojn poste ĵurnalisto en *Moreton Bay Courier* estis pli "realisma":

> *... se estas maljuste okupi la teron – rezignu pri ĝi; se estas juste – okupu ĝin kiel antaŭe, pace se eblos, sed kiam estas donita tia terura provo, ke paco ne eblas, traktu ilin, kiel ili meritas; se estas vane provi sensovaĝigi ilin, do detruu ilin, same kiel vi farus al alia sovaĝa besto, ĉar* homoj *ili ne meritas esti nomataj.*

Post 120 jaroj da nedeklaritaj militoj ŝajnis, ke la aborigenoj formortos. Daisy Bates, iuspeca misiistino, kiu fakte vivis inter aborigenoj, raportis tiel ĉi en 1921:

> *Oni neniam forgesu, ke la blankuloj de Aŭstralio traktas mortantan rason.*

*Daŭras sur paĝo 26* >

*Ĉio, kion oni povas fari, estas igi pli facila ilian forpason. Oni ne povas tro emfazi, ke la aborigenoj estas mortanta raso. En la renkontiĝo de civilizacio kaj primitivuloj, tiuj ĉi devas malaperi.*

Tiun konvencian vidpunkton substrekis iu profesoro Cleland en 1928:

*La plensanga aŭstralia aborigeno rapide formortas. Jam sur tre grandaj partoj de la civilizitaj regionoj li komplete malaperis. Dum antaŭenmarŝas civilizacio, post nur kelkaj jaroj okazos, plej probable, absoluta malapero de plensangaj indiĝenoj.*

Tamen tiu profetaĵo ne plenumiĝis. Eble la "plensangaj" aborigenoj grandparte formortis, sed tiuj de miksa sango – rezulto de kutima ekspluatado de aborigenaj virinoj far blankaj viroj – plimultiĝis. Kion fari pri tiuj "miksrasuloj"? Dum kelkaj generacioj la "solvo" estis forpreni de la patrinoj "saveblajn" infanojn – tio estas, tiujn kun relative pala haŭto – kaj eduki ilin kiel servistojn. Fine la aborigena elemento estos pli-malpli malaperinta. La eminenta politikisto Paul Hasluck skribis en 1938:

*[La duonaborigenoj] eble profitus de ŝanco atingi pli bone por si, se oni donus al ili ŝancon. Hodiaŭ ili svarmas en indiĝenaj loĝlokoj sen prizorgado. Multaj el ili – ridantaj, malbone vestitaj buboj, akute inteligentaj – estas preskaŭ blankaj kaj kelkaj tiel palaj ke, post bona lavado, ili probable restus nerimarkataj en iu ajn grupo da blankuloj.*

Direndas, ke oficiale oni ne plu aŭdas tiajn opiniojn en la 21-a jarcento krom el la buŝoj de dekstraj ekstremistoj. Sed foje oni spertas, ke subsurface cirkulas mallumaj vidpunktoj.

---

# Pri ekzamenoj

**TREVOR STEELE (ADELAJDO)**

En 2004 mi akceptis estri la ekzamenan komisionon, esperante, ke baldaŭ iu alia transprenos. Tio ne okazis, sed nuntempe ekzamenkandidatoj tre malofte sin anoncas. Fakte neniu dum kelkaj jaroj. Mi ne sciis, sed kelkaj ĉi-landaj homoj faris la ekzamenojn de KER, kaj tio estas logika paŝo.

La nuna ekzamenaro de AEA estas iom eksdata, kaj KER estas moderna kaj paralelas la evoluon de ekzamenado en aliaj lingvoj.

Pro tio mi proponis al la estraro de AEA, kaj ricevis ĝian konsenton, ke se iu volas ekzameni, ni direktu ŝin/lin al KER, kies respondeculino estas Katalin Kováts (**katalin.kovats@gmail.com**). Oni devas pagi kotizon por ekzameniĝi, sed necesas demandi pri tio ĉe Katalin.

**Unu escepto:** se estos ambiciuloj, kiuj deziras fari la *klerecan ekzamenon* de AEA, mi volonte agos kiel ekzamenanto. La nivelo de nia klereca ekzameno estas pli postula ol eĉ la plej altgrada KER-ekzameno. La klereca ekzameno postulas sciojn pri la historio de Esperanto, elstaraj esperantistoj, pri la gramatikaj diskutoj (ekz, -ita/-ata). Krome oni devas skribi kelkajn originalajn pecojn kaj recenzojn. Plej malfacila estas la tradukado de diverstemaj kaj diversstilaj anglalingvaj tekstoj.

# Arboj

**KATJA STEELE (ADELAJDO)**



La arboj kaj homoj ĉiam vivis en simbioza rilato. Arboj donis al ni kaŝlokon okaze de malbona vetero aŭ danĝero, donis al ni diversajn fruktojn por manĝi, foliojn, florojn kaj radikojn por prepari kuracilojn. Ili donis al ni lignon, el kiu ni faris ilojn, armilojn kaj ludilojn kaj multe da ligno por konstrui domojn, boatojn, pontojn. Sed eble plej signife, arboj donis brulaĵon por fajro.

Laŭ pluraj malnovaj instruoj la universo konsistas el spirala aŭ cirkla moviĝo ĉirkaŭ la centra akso, la "*axis mundi*" (mondakso). Kaj tiu centra "stango" estis prezentita kiel La Arbo de la Vivo aŭ La Mondo-arbo. Esence ĝi estas bildo de la tuta universo, aŭ almenaŭ nia planedo, kaj enhavas la ideon, ke ĉiu speco de vivo estas interrilata kaj sankta. La Arbo de la Vivo estas koncepto, kiun eblas trovi jam en neolitiko, kaj poste ĝi eniris diversajn filozofiojn de multaj kulturoj. En zoroastrisma Persio estis *Haoma arbo*, en la centro de la islama paradizo *Taoba arbo*, en la skandinavaj mitoj monda arbo *Yggdrasil*, *'Ez Chajim* en judismo, *Ts'ogs-shing*, la "renkontiĝarbo de la dioj" en la tibeta budhismo.

Kaj certe vi multfoje aŭdis pri la Arbo de Scio en Edeno, en la Biblio, reprezentanta saĝecon.

Jam de la praaj tempoj arboj estis ligitaj kun feminaj diaĵoj. Ekzemple, en la praa Egiptio la vorto por esprimi naskon

*Daŭras sur paĝo 28* >

estis derivita rekte el la vorto arbo. Tio ne estas hazardo. La arbo de la vivo estas la granda patrino de ĉiu kreitaĵo. La nordamerikaj indianoj nomas arbojn "niaj starantaj fratoj kaj fratinoj". Ili kaj la homoj same havas vertikalan orientiĝon.

En la praa irlanda alfabeto *Ogham*, konsistanta el 20 literoj, ĉiu litero estas nomita laŭ specio de arbo grava por la loĝantoj de la praa kelta Irlando. Sidharto Gautamo, konata kiel Budho, serĉis sub sankta arbo la plej altan scion – kaj li trovis ĝin. La saĝo de arboj memorigas nin, ke lernado komenciĝas per aŭskultado.

En la praa skandinava lingvo radiko *vid* signifas "arbo". Druido estis tre saĝa sciopova persono. La vorto konsistas el gaŭla kelta parto *dru* (tre, alte, pleje) kaj *vid* (scio). Kaj tiu scio venas el la arbaroj, ne nur ĉar la druidoj estis trejnitaj dum ĝis 20 jaroj en foraj arbaraj akademioj, sed ankaŭ ĉar *ĉiu* origina scio venas el arboj. Dio estas la fonto, arboj estas la kanaloj.

Al mia magistrato viro venis postulante, ke ili forhakigu vojrandan arbon, ĉar ĝi floras kaj la homo estas alergia al poleno. Alia volis forhakigi la arbon, ĉar ĝiaj falintaj folioj estas pikaj. Tria ŝatus forigi la vojrandan arbon, ĉar ĝiaj semoj estas disportataj de la vento kaj etaj arbetoj abunde aperas en la apudaj ĝardenoj. Tute ne perfektaj arboj! Ĉu ni, homoj, estas perfektaj? Ĉu iu el ni povas kaŭzi malsanon aŭ malagrablaĵon al alia? Ĉu estas agrable vivi kun aŭ apud ĉiu el ni? Ĉu niaj vortoj kaj agoj foj-foje ne dissemadas ĉirkaŭen nedeziratajn "kreskaĵojn"? Tute ne perfektaj homoj!

Estu pli toleremaj al la arboj. Ili estas niaj plej fortaj alianculoj. Ili donas tiom multe: belecon, ombron, oksigenon... Ĉiu el ili kapablas sorbi bruon kaj malplivarmigi la aeron. Nur per esto en la ĉirkaŭaĵo de arboj kaj rigardo al la arboj niaj streso kaj sangopremo malpliiĝas. Unu granda arbo produktas jare proksimume 120 kg da oksigeno – tio signifas, ke ĝi jare donas sufiĉe da oksigeno por du homoj.

La arboj silentas. Ili ne petas, ili donas. Ne grumblas, ne plendas. Verŝajne ili havus kelkajn kialojn por fari tion. Malgraŭ tio ili tamen helpos savi niajn vivojn.

La homaro alfrontas grandan klimatan krizon. Ni devas komenci denove aŭskulti. Kaj fari tion zorge.

**Uzitaj fontoj**

*Mind, body, spirit* #66, Summer 2021

**bit.ly/graveco-de-arboj** (tradukita en Esperanton per GoogleTranslate) – originalo en la ĉeĥa estas ĉe **earthkarma.cz/blog/vyznam-stromu-pro-cloveka--i-jen-jeden-strom-dokaze-zazraky/**



# El la regionoj

## Sud-aŭstralia Esperanto-klubo Jarraporto pri 2022

**Estraro:** Trevor Steele – prezidanto, Sandor Horvath – vicprezidanto, Indrani Beharry-Lall – kasisto, Katja Steele – sekretario

**Membraro:** Registritaj estis 25 personoj. Helen kelkfoje laboris en fora loko kaj Sandor kutime akompanis ŝin, sed pere de Zoom ili tamen partoprenadis la kunvenojn. Margaret kaj Max ne povis aktivi pro sanproblemoj. La Kronviruso pli kaj pli malfortiĝadis, sed ankoraŭ estis danĝera. Iom post iom ni reiris al personaj kuniĝoj kun eblo partopreni Zoom-e. Pri la grupo en Whyalla ni ne aŭdis. Matt ekhavis laborpostenon kaj pro tio ĉesis esperantumi, Marja kaj Birgitta ne aktivis. Paul estis grave malsana (kancero), lia filo iĝis universitata studento kaj ne plu esperantumis.



**Arĥivo:** Katja daŭrigis gvidi la kluban kronikon.

**Legogrupo:** Ĝi regule kunvenadis per la reto kun la teknika prizorgado de Andrew. Preskaŭ ĉiuĵaŭde kunvenadis ĝis 7 homoj: Trevor, Cathy, Bob, Andrew, Brendan, Carol, Libby (malofte). Ili legis *La nevidata mondo* (Huigh Benson) kaj *La sangoruĝa flago* (Trevor Steele).

**Klubaj kunvenoj:** Okazis entute 10 kunvenoj, kelkaj el ili hibridaj, sed plejparte Zoom-aj.

**Apartaj programoj:**

- La 90-a naskiĝtagfesto de Bob Felby (12 homoj)
- La 70-an naskiĝtagfeston de Sandor (kun granda nombro de partoprenantoj) ĉeestis ankaŭ esperantistoj, la 10-an de septembro)
- Kviza posttagmezo de Trevor (la 12-an de novembro, 12 esperantistoj)
- Zamenhof-tago ĉe Indrani (17 decembro, 10 homoj)

**Instruado:** Paul Desailly re-malfermis en Innovation Factory (en Halifax-strato 60) E-centron. Li donis tie 3 lecionojn al 3 junaj homoj.

Trevor instruadis pere de la reto al Sebastian Blake (kiu dum parto de la jaro studis en Tajlando).

Kun paŭzoj sed dum la tuta jaro Andrew instruis al Eileen. Ĉar Eileen ne partoprenadis la Zoom-ajn kunvenojn de la legogrupo, ŝi legis la aktualajn legaĵojn kun Andrew. La lecionoj kun la juna Levi Hickey daŭris dum la tuta jaro kutime en kafejo Kingdom for Horse (kiel pasintjare). Fine de la jaro pere de Meetup trovis Andrew-n la juna Liam Phillips, kiu iam jam lernis iomete de Esperanto. Li intencas rekomenci la lernadon.

Andrew havis proksimume 15 duonhorajn Zoom-ajn sesiojn kun Mary Mills (en Orange). Mary estas malnova esperantistino, kiu en Orange ne havas okazojn por praktiki la lingvon.

**Informado:** Al la Novaĵbulteno (redaktita de Roger Springer) kelkfoje estis senditaj mallongaj raportoj pri la okazintaĵoj en Adelajdo.

En *Adelaide East Herald*, posemajna ĵurnalo de tri magistratoj en Adelajdo, daŭre aperigadis inter la listitaj programoj ankaŭ la E-kunvenoj en la komunumejo en Clarence Park, sed neniu nova interesiĝanto aperis.

**Biblioteko:** Restas en la hejmo de Charles Stevenson.

**Libroservo:** Nenia vendo.

**Diversaj:** Paul Desailly ankoraŭ estis komitatano de UEA por Aŭstralio kaj Katja Steele ĉefdelegito de UEA.

Sandor laboras kiel prezidanto de AEA.

Trevor kelkfoje prelegis kadre de la serio de dimanĉaj AEA-prelegoj (zoom-aj). Dum la tuta jaro li Zoom-e instruis al grupo de Aziaj studentoj.

# KONTRIBUU al ESPERANTO
sub la suda kruco




**Agnoskoj pri fotoj**

**4** Jonathan Cooper
**5** Moskulo: Wildlife Conservation Society (WCS/Julie Larsen Maher), per Snopes
**6** Betty White: Wikimedia, CC BY 2.0; Elreliĝo – maldekstre: Netflix; – dekstre: Reddit–uzanto Wolfy092, per Snopes
**7** Baraĵo Tri Gorĝoj: Wikimedia, CC BY 2.0; Nematodoj: Doklady Biological Sciences, per Snopes; Helen Keller: Wikimedia, CC BY 4.0
**8** Charles Stevenson
**10** JESHOOTS.COM per Unsplash
**12, 13** David Ryan
**15** Zeŭso: *Zeus faber* de:Benutzer:Kleines.Opossum, per Wikimedia, CC BY-SA 3.0
**20–23** Kiel montritaj
**24** Kit Kelen
**27** Casey Horner, per Unsplash
**28** Jonathan Cooper
**29** Sturt Desert Pea at White Cliffs-7 (21186541933): Wikimedia, CC BY-SA 2.0
**32** Internacia reta kunveno per Zoom, uzante Esperanton: Jonathan Cooper

# Australian Esperanto Association

GPO Box 2122
Melbourne VIC 3001
Australia

esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
(07) 4696 9293

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Joanne Johns | **Secretary**

**Committee Members:**
Terry Manley, Esther Parris

AEA was established for the promotion, teaching, and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



# New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
esperantonewzealand@gmail.com
0800 350 781

Bradley McDonald | **President**
Chris Krageloh | **Vice-President**
David Ryan | **Secretary/Treasurer**
Dave Dewar | **Assistant Secretary**

**Committee Members:**
Erin McGifford, Josuo Moss, Stephen Epstein

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

# What *is* this?

Have you picked up this magazine by chance and are wondering what language it is? It might look a bit like Spanish, but it's actually Esperanto.

**What is Esperanto?**

Esperanto was specially planned and created as a neutral second language for people all over the world. So, if you come across someone from, say, Finland, you wouldn't have to speak Finnish and they wouldn't have to speak English.

Originally developed in the 1880s, Esperanto is currently experiencing a resurgence, with more and more people discovering and learning it online. It's spoken in over 100 countries and there are thousands of Esperanto clubs worldwide.

Esperanto is much easier to learn than any national language, because it was designed to be easy to learn. It's completely phonetic, and its grammar is logical and regular.

You can use Esperanto for travel, information, friendship, hobbies, and even business. The World Esperanto Association publishes a list of names and addresses of people who are happy to have you stay with them for free if you speak Esperanto.

The internet makes it easy to connect to Esperanto speakers in any country. Google, Facebook, Firefox and Linux all support Esperanto. There's an Esperanto version of Wikipedia, which has over 300 000 articles (more than the Hebrew version, for example).

**Isn't English enough?**

National languages like English give an unfair advantage to their native speakers. People who have studied English for over ten years still feel at a disadvantage when talking with a native speaker.

Interested? See the contact details on the inside back cover.

